

## Klubo la Amikoj de Esperanto, p. 18

♦ Joululahjaksi yhteiskieli, p. 4

♦ Esperanton kesäkurssi lisäalnessa – Somera kurso en lisalmi, p. 8

♦ Vintraj Tagoj 2016 en Hämeenlinna, p. 12

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.  
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.  
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.  
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.  
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.  
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)  
Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*  
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ [robog@gmx.de](mailto:robog@gmx.de)  
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ [maj-lis@maisanjapa.info](mailto:maj-lis@maisanjapa.info)  
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 24 €/vuosi/år/jaro, 25 € ekde 2016:1  
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**  
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.  
☎ 044 2642 742 ✉ [eaf@esperanto.fi](mailto:eaf@esperanto.fi)

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.  
**Pankkitili/Bankkonto:** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.  
**Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto:** 300  
**Kansi/Pärm/Kovrile:** Mana instruas, Foto: Mana Namutema Brinson / KAE

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*  
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ [eafprezidanto@esperanto.fi](mailto:eafprezidanto@esperanto.fi)  
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*  
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ [paivi.saarinen@iki.fi](mailto:paivi.saarinen@iki.fi)  
**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*  
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi)

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**  
*Robert Bogenschneider*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ [robog@gmx.de](mailto:robog@gmx.de)  
*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ [tiina.kosunen945@gmail.com](mailto:tiina.kosunen945@gmail.com)  
*Arja Kuhanen*, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ [arja.kuhanen@netti.fi](mailto:arja.kuhanen@netti.fi)  
*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com)

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**  
*Tapani Aarne*, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi)  
*Börje Eriksson*, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ [esperarto@phnet.fi](mailto:esperarto@phnet.fi)  
*Tuomas Latva-Pirilä*, Ratakatu 6 as. 12, 96100 Rovaniemi. ☎ 0400 702 816 ✉ [tuomas.latva-pirila@suomi24.fi](mailto:tuomas.latva-pirila@suomi24.fi)

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*  
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ [eafkasisto@esperanto.fi](mailto:eafkasisto@esperanto.fi)  
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**  
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)  
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.  
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ [eaf@esperanto.fi](mailto:eaf@esperanto.fi)

**Internet:** [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi) ♦ [www.facebook.com/Finnlando](https://www.facebook.com/Finnlando) ♦ Twitter: @finnlando aŭ [twitter.com/#!/finnlando](https://twitter.com/#!/finnlando)

## Salutvortoj de EAF al Fondumo Esperanto Säätiö 24.10.2015

### Estimataj kaj karaj gesamideanoj,

inter la kvar organizaĵoj hodiaŭ ĉi tie ĉeestantaj mi havas la honoron saluti en la nomo de la plej aĝa. Esperanto-Asocio de Finnlando estis fondita la 28-an de aprilo 1907, precize je unu jaro antaŭ Universala Esperanto-Asocio. La unua prezidanto de la Finnlanda asocio estis *Nino Runeberg*, lingvisto, instruisto kaj verkisto, nepo de *Johan Ludvig Runeberg* nomata (daŭre) ”la nacia poeto de Finnlando” kaj (siampe, eble plu) la plej genia manipulantulo de la sveda lingvo.

La esperantistaj EAF, UEA kaj la jubileanta Fondumo Esperanto Säätiö estas tri. La kvara ĉeestanta estas Unuiĝintaj Nacioj hodiaŭ jubileanta sian 70-an jaron. Ne nur pro data koincido donacanta al ĉi tiu tago solenecon kun flagflirtado, sed tiel pro formalaj ligoj – EAF estas membro de Finnlanda Asocio por UNO, *Suomen YK-liitto* – kiel, pli grave, pro la akceptitaj valoroj, homaj rajtoj apartenantaj al ni ĉiuj. Akceptante la socian devon doni al ĉiu homo egalan spacon kreski kaj esti, kaj akcentante la rajton komuniki, ni sekvas la Zamenhofan idealon.

Inter la epoko de Zamenhof, de *Hector Hodler*, de Nino Runeberg kaj aliaj pioniroj de la komunlingvo kun ties movado kaj nia tempo kuŝas jarcento, kiu ne tute aspektas progreso. Fojon post fojo la homaro trovas sin en memfaritaj katastrofoj. Aktuale multaj Eŭropaj landoj, ankaŭ la nia, spertas sekvojn de tiuj. Sed



por ni en Finnlando – bonŝance! – la situacio ne katastrofas, sed male prezentas defiajn ebledojn homajn, ekonomiajn kaj – komunikajn. La finna lingvo jam de du jardekoj fariĝis interlingvo, komunlingvo en skalo ne pli frue spertita.

Ni postsekvantoj de la Zamenhofa idealo en la mondo de konfliktoj, kion pensi? Ĉu nia aspiro al homrajta komunika ordo estas simple nerealista, kiel aspiro al harmonia internacia (kaj ne nur internacia) vivo aspektas nerealista, neniam kondukota al ia ”fina venko”? Mi citu la esperantiston *Ingemund Bengtsson* (1919–2000), prezidanto de la Svedia parlamento en 1979–1988: ”Mi konsentas, ke Esperanto estas speco de utopio. Tiel ankaŭ monda paco. Mi batalas por ambaŭ.”

En la reala mondo nia batalo por nia ”nerealista” idealo bezonas materian bazon. Tiun produktas kaj provizas niaj propraj organizaĵoj sur niaj propraj fortoj. FES en tio elstaras. EAF gratulas kaj dankas.

Esperanto realas, vivas en reala mondo. Historio finon ne havas.

*Tuomo Grundström*

# Joululahjaksi yhteiskieli

Suomi muuttuu. Euroopan siirtomaa- ja sotahistoria on palannut lähtömailleen tänä vuonna ja varsinkin sen jälkipuoliskolla tuntuvammin kuin koskaan ennen pakolais- ja siirtolaisjoukkoina. Suomeen ei ole koskaan ennen tullut niin paljon ulkomaalaisia niin lyhyessä ajassa. Lähes kaikki hakevat turvapaikkaa sodan tai vainon vuoksi. Enemmistö on nuoria miehiä, joista monilla on kotimaissaan vaihtoehtoina tulla pakko-otetuksi sisällissotaa käyviin armeijoihin (rosvojoukkoihin!) tai sitten tulla tapetuiksi tai paeta. Se kansainvälisen yhteisön osa, johon Suomi ja Euroopan Unioni kuuluu, ei voi paeta omaa vastuutaan niistä oloista, joihin Irak, Afganistan, Syyria ja joukko muita maita on saatettu.

On varmaa, että suuri osa tästä joukosta jää Suomeen. Kuinka suuri osa, jää nähtäväksi; joka tapauksessa Suomen väestö täydentyy, uudistuu ja muuttuu meneillään olevan kansainvaelluksen vuoksi. Onko se Suomen kannalta hyvä vai huono asia, on helposti vastattu: maailman nuoriso on muualla, ja sen suuntautuminen meidän nuutuviin nurkkiimme on meille etu. Menetyksellä se on heidän lähtömaissaan.

Ei ole meille suomalaisille kunniaksi, että jotkut meistä suhtautuvat avoimen, jopa aggressiivisen torjuvasti näihin uusiin ihmisiin. Torjunnan pohjalla vaikuttaa pelko siitä, että maahanmuuttajat vievät jotain. Jotain aineellista? Työpaikan? Sekoittavat ihmissuhteita? Varmasti niin tapahtuukin, ja niin pitääkin: maahanmuuttaja tuo mukanaan omat tarpeensa ja, etenkin, oman osaamisensa ja työkykynsä, oman elämänsä, josta tulee osa meidän omaa yhteisöämme. – On luonnollista tuntea levottomuutta tällaisessa tilanteessa; maahanmuuttaja saattaa oikeasti olla minua ja sinua etevämpi.

Siinä suhteessa maahanmuuttajasta voi todellakin tulla (ja hänen jälkeläisistään aikanaan!) ”kantasuomalaista” etevämpi, että he luovat meidän kieliyhteisöömme sellaista kansainvälistä osaamista, jota takavuosikymmeninä oli Suo-

nessa kovin vähän. Suomesta on nyt noin yhden sukupolven aikana tullut suurten joukkojen yhteiskieli. Eivät vain muutamat, vaan jo sadat tuhannet omaksuvat suomen yhteiskielekseen. Jos ajatellaan vaikka vain talouselämän tarpeita, meillä ei ole koskaan ennen ollut sellaista kielivariantoa kuin nyt on jo saatu ja joka kohenee ja kasvaa.

Meille esperantisteille on luonnollista kohdata uudet naapurimme Zamenhofin hengessä, ihmiskunnan jäsenenä. Me olemme erilaisia, ja maailmassa on alueellisesti erilaista valtiollista, taloudellista ja kulttuurista järjestäytymistä. Meille tullaan, koska maailma ei ole tasa-arvoinen ja me olemme etuoikeutetulla puolella. Näin Zamenhof määritteli ajatteluaan:

*”Homaranismo-aatetta ei saa sekoittaa niin sanottuun kosmopolitismiin. Ei myöskään pidä erehtyä luulemaan, että vastustaessaan ihmiskuntaa jyrkästi jakavaa kansalliskiihkoa aattemme pyrki häviyttämään olemassaolevia kieliiä ja uskontoja. Rehellinen patriotismi kehottaa kansalaista pyrkimään täyteen yhteisymmärrykseen ja veljeyteen maanmiesten kesken lainkaan kieltämättä häntä rakastamasta eniten kotiseutuaan ja perhettään, puhumasta kotimurretaan ja tulemaan omalla uskollaan autuaaksi. Vastavaasti Homaranismo-aate ei lainkaan vaadi kannattajaansa luopumaan rakkaudesta kotimaataan ja omaa kieltään kohtaan eikä peritystä uskonnostaan; se vaatii häntä vain pitämään ne ominaan, niin että hän ei tyrkytä kansallisia tai muita erityisominaisuuksiaan muille; että hän ei pidä näitä ihmisiä onnettomasti erottavia asioita korkeana hyveenä, jota pitäisi kaikin voimin viljellä; ettei hän tee jumalankuvaa eikä taistelullippua kylläkin luonnollisista, mutta kuitenkin vain itsekkäistä lähtökohdistaan.”*

Annetaan joululahjaksi kieli ja yhteisön jäsenyys.

Tuomo Grundström

## Vojaĝstipendioj por junuloj – Matka-apurahoja por la junuloj

Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) ofertas tri stipendiojn al junuloj por partopreni iun esperantoeventon. La stipendioj valoras maksimume po 400 € kaj celas kovri la partopren- kaj vojaĝkostojn.

La stipendipetantoj rajtas mem elekti la partoprenotan arangon, kiu povas esti ekzemple la somera kurso de EAF en Iisalmi aŭ iu internacia evento kiel Internacia Junulara Kongreso (IJK) aŭ Kultura Esperanto-Festivalo (KEF). Ekzemple ĉe [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu) troveblas multaj eblaj eventoj.

La kondiĉoj estas, ke la ricevanto jam konas la elementojn de Esperanto kaj estas preta post la evento raporti pri sia partopreno en Esperantolehti.

La liberforman peticion oni direktu al la estraro de EAF kaj sendu al estrarano Paula Niinikorpi retpoŝte ([paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com)) preferinde antaŭ la celata vojaĝo aŭ plej laste la 31-an de majo 2016. Ŝi donas laŭbezone ankaŭ pliajn informojn.

*Suomen Esperantoliitto jakaa kolme matka-apurahaa nuorille esperantotapahtumaan osallis-*

*tumiseksi. Apurahoilla on tarkoitus kattaa matkajien osallistumis- ja matkakulut, ja ne ovat suuruudeltaan kukin korkeintaan 400 euroa.*

*Apurahan hakija voi vapaasti valita tapahtuman, johon osallistuu. Kohde voi olla esimerkiksi Esperantoliiton järjestämä kesäkurssi Iisalmessa tai jokin kansainvälinen tapahtuma kuten Internacia Junulara Kongreso (IJK) tai Kultura Esperanto-Festivalo (KEF). Esimerkiksi sivustolta [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu) löytyy melko kattava listaus esperantotapahtumista.*

*Hakuehtona on esperanton alkeiden osaaminen. Matkan jälkeen tulee myös kirjoittaa raportti Esperantolehteen tapahtumaan osallistumisesta.*

*Vapaamuotoiset hakemukset osoitetaan Suomen Esperantoliiton hallitukselle ja toimitetaan hallituksen jäsen Paula Niinikorville sähköpostitse osoitteella [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com) mielellään ennen aiottua matkaa tai kuitenkin viimeistään 31.5.2016. Paula Niinikorpi antaa tarvittaessa myös lisätietoja.*

*La estraro de EAF –  
Esperantoliiton hallitus*

### Eventokalendaro – Tulevia tapahtumia

- 14.12.2015. . . . . Zamenhof-tago en *Tampere*
- 15.12.2015. . . . . Zamenhof-tago en la oficejo en *Helsinki*
- 16.12.2015. . . . . Zamenhof-tago kaj jula festeto de EST en *Turku*
- 12.3.–13.3.2016. . . . . Vintraj Tagoj en *Hämeenlinna*
- 2.–10.7.2016 . . . . . 52-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en *Birštonas*, Litovio
- 14.–17.7.2016 . . . . . Somera kurso en *Iisalmi*
- 16.–23.7.2016 . . . . . 72-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en *Wroclaw*, Pollando
- 23.–30.7.2016 . . . . . 101-a UK en *Nitra*, Slovakio

Pri detaloj, vidu ligilojn en [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi)

## Oktobra vojaĝo al Finnlando

Mi sidas en la atendejo en la flughaveno de *Helsingfors* por reiri hejmen post plena enhavoriĉa semajno vizitante esperantajn amikinojn en Finnlando. Mia kapo plenas de multspecaj bonaj memoroj pri la vere kulturplena semajno.

Kun Saliko mi vizitis la vitromuzeon en *Riihimäki*. Ŝia filo kondukis nin per sia propra aŭto, io kio tempe tre mallongigis al ni la vojon. Ni evitis la atendadon inter trajnoj kaj busoj. La muzeo montras la historion de vitrofarado en la lando. Ofte kiam temas pri kulturaj atingoj ili venas al niaj nordiaj landoj sufiĉe malfrue, ekz. la vitrofarado venis al ni en 1400–1500 – kompare kun en Ĉinio, kie oni kapablis krei vitraĵojn jam longe antaŭ Kr. Nun tamen ni nordlandanoj kapablas fari belajn artovitraĵojn. Ni ankaŭ vidis multajn artaĵojn teksitajn kaj ŝajnas ke la buntaj koloroj de la finna naturo kun lagoj kaj marĉoj reaperas en vestoj kaj teksaĵoj. Multajn tiajn belajn aĵojn ni vidis en butikoj en *Helsingfors* kaj en *Tavastehus*.

En tiu laste menciita urbo Saliko kaj mi pasigis tre interesan kaj instruan tagon kun la Esperanto-knabinoj, la tiea klubo. Ni estis akceptitaj de du "knabinoj Marjatta" ĉe la trajno kaj kune promenis en la bela Urboparko, kiu estas naturrezervejo kun multaj ekzotikaj arboj kaj kie lagobrakoj brakumas la arbaron. Nun la folioarboj pompas en belaj aŭtunaj koloroj – flavaj, verdaj, ruĝaj.

Nia plej grava celo de la promonado estas la antikva kastelo *Tavastehus*, kiu estis konstruita en 1260. La unua konstrumaterialo konsistis el grandaj ŝtonoj. Dum la 14-a jarcento oni lernis bruligi brikojn kaj uzis tiujn por konstrui belajn volbojn kaj murojn kun specialaj baltiaj ornamaĵoj. *Birger Jarl*, kiu ankaŭ fondis *Stokholmon*, ekkonstruigis la fortikaĵon aŭ kastelon, *Tavastehus*. Ni per diversaj partoj de la



Kerstin prezentas la monologon "La prelego" verkitan de H. Brown en Hämeenlinna. Foto: Saliko

konstruaĵo bone sekvis la uzadon de la domo. Surmure pendis bela gobelino, kiu montaris kiel *Birger Jarl* enrajdis sian kreaĵon – la fortikaĵon.

*Marjatta Niemi* lerte el sia abunda kono pri *Tavastehus* rakontis pri la kastelo kaj vivigis ĝin ekde la komenco, 1260 sub la manoj de *Birger Jarl*, tra ĝia historio kiel apudlima defendilo kaj administrejo en fora angulo de la regno, tra la tempo kiel prizono en la 19-a jarcento, kiam la fortikaĵo ne plu situis ĉe la limo, ĉar la situo de la limo ŝanĝiĝis. Estas belega fortikaĵo kun interesa historio.

Nia grupeto faris belan promenadon tra la malnova urbo kun malnovaj domoj de la 19-a jarcento. La fama komponisto finna, *Jean Si-*

*belius*, naskiĝis en tiu urbo kaj lia naskiĝdomo nun estas muzeo. Ankaŭ en la fortikaĵo oni montris memorojn de lia vivo. Ĉi tiun jaron oni jubileas 150 jarojn de lia naskiĝo. Ni promenis tra la Sibelius-parko, kiu enhavas statuon de la komponisto. Sidante sur benkoj en la parko oni aŭdis aŭtomate ludatajn partojn el liaj verkoj. *Hämeenlinna* vere estas ĉarma historia urbo.

Post bona lunĉo en agrabla Ital-inspirata restoracio ni konatiĝis kun pli da "esperanto-knabinoj" en la belega hejmo de Marjatta Niemi. Mi legis la monologon "Prelego" el la libro "Eduko Danĝera" verkita de *Harold Brown*. Ĉiuj knabinoj sekvis la tekston kun granda atento kaj intereso. Fine ni interdiskutis pri la teatraĵo.

Vespere ni manĝis laŭdire franc-inspiritan manĝon kun seranoŝinko kaj bona fromaĝo. Post la manĝo aperis lerta magiisto, kiu profesie "ludis" per kartludo. Montriĝis, ke li estas nepo de la ges-oroj Niemi, kiam li remagiigis en la realon. De tempo al tempo mi trafolumis la faman libron "La Rakontoj de subleŭtenanto Stål" verkita de *J.L. Runeberg* (la nacia verkisto de Finnlando). La libro estas printita 1900, 50 jarojn post kiam ĝi estis verkita. Ĝi enha-

vas ilustraĵojn de la fama artisto *Albert Edelfelt*. Libro vere valoras. Miaj manoj kaj okuloj ĝuis renkonti ĝin!

Pri ĉio tio mi pensis sidante en la atendejo kaj mi sendis varman dankon al la Esperanto-knabinoj, kiuj aranĝis tiun belan tagon. Ankaŭ dankon al Saliko, kiu gastigis min dum mia restado en Finnlando. En Hämeenlinna estos aranĝitaj en marto "La Finnaj Vintraj Tagoj".

La aviadilo leviĝas de la grundo. La fortaj motoroj levas nin supren al la klara, blua ĉielo. Sunbrilo laŭ la horizonto turkizkolorigas la randon ĉe la maro. Eknigriĝas la tero. Eĉ pli nigriĝas la akvosurfaco de la multaj lagoj. La pensoj iras al dana lulkanto "Patrino, la suno estas tiel ruĝa kaj la tero nigriĝas". Malhelpflava plena luno staras je la alia flanko de la ĉielo. Inter la sunbrilo kaj la luno pendas ĉenoj da blankaj nuboperloj, kiuj baldaŭ oriĝas per la lastaj sunradioj. La ĉiela artaĵo perfektas. Post 40 minutoj de tia ĝuo la aviadilo surteriĝas en la flughaveno Arlanda kaj la mondo denove re-alas.

Dankon al ĉiuj miaj finnaj amikinoj!

*Fino de oktobro 2015*  
*Kerstin Rohdin*

## Universala Medicina Esperanto-Asocio informas

Venontsomere antaŭ la UK en Nitro en Slovakio estas planata la 20-a Medicina Konferenco de la 20-a ĝis la 22-a de julio. La faka konferenco ricevos apogon de la plej altaj registaranoj de Slovakio kadre de la slovakia EU-prezidanteco.

Kongresaj lingvoj estos kaj Esperanto kaj la slovaka. Temo de la konferenco estos "Medicinistoj kaj tutmondiĝo – kiajn kuracistojn bezonas la nuna jarcento?"

Kondiĉoj por realiĝo de la konferenco estas,

ke antaŭ la 1-a de aprilo aliĝos minimume 25 Esperanton parolantaj medicinistoj kaj ke minimume 8 esperantistoj pretas prezenti fakan prelegon per Esperanto.

La kongresa kotizo estos 25 eŭroj sen tranoktado kaj manĝoj. Eblas jam nun aliĝi per reta letero al [umea@uea.org](mailto:umea@uea.org). Se vi estas medicinisto, ne hezitu aliĝi kaj kontribui per via partopreno al la sukceso de tiu faka aranĝo!

*Arja Kuhanen*

# Esperanton kesäkurssi Iisalmessa – Somera kurso en Iisalmi 14.–17.07.2016

## Esperantoa, luonnollisesti – Esperanto, nature

Memoru plani vian someron tiel, ke vi rezervos tempon por la Somera Esperantokurso de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) en Iisalmi 14.–17.7.2016. La kurso estas aranĝita kunlabore kun la Esperantoklubo en Iisalmi kaj ELFI.

Jam en la alventago merkrede 13.7. estos antaŭkurso programo kun amuza kunestado kaj farado de krespoj. Dum la kursotagoj estos instruado 5–6 horojn por grupoj en ĉiuj niveloj de elementa ĝis progresiga sub gvido de la ĉefinstruisto *Gražina Opulskienė* el Litovio kune kun la kursorespondeculo kaj helpinstruisto *Tiina Oittinen*. Sed ni uzas la internacian lingvon nature ankaŭ dum la libertempo, kiam ni konatiĝos kaj i.a. en kamparaj laboroj de la bieno kaj en la vidindaĵoj de la urbo Iisalmi kaj ĉirkaŭaĵo. La kursejo situas en la kamparo proksime de la bieno de *Onni Kauppinen*.–

**Kursokotizoj** (13.–17.07.): 55 € po tago kun tranoktakto en la amasloĝejo ĉe la bieno (parte tendaro) de Onni aŭ 40 € po tago se vi elektos alian tranoktejon, ekzemple hotelon en Iisalmi. La kursokotizoj inkluzivos instruadon,

manĝaĵojn, kafojn kaj transportojn el Iisalmi kaj reen kaj la plej grandan parton de la ekskursaj kostoj. La kotizon vi pagos kontante surloke (informiĝu ĉe la sekretario de EAF).

Aliĝoj al sekretario de EAF:

Tiina Oittinen, [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi), tel.+358 50 5494709

Informojn pri kursopraktikaĵoj donas ankaŭ Onni Kauppinen, tel.+358 500 813530.

En venontaj gazetoj kaj en niaj retpaĝoj estos pliaj informoj kaj aperos la detala kursoprogramo!

*Muista varata aikaa ensi kesänä niin, että pääset mukanaan Suomen Esperantoliiton kesäkurssille Iisalmen maisemiin. Kurssi järjestetään yhteistyössä Iisalmen Esperantoklubin ja Suomen opettajien esperantoyhdistyksen kanssa. Jo saapumispäivänä 13.7. on yhteinen illanvietto muurin pohjalettuja paistaen.*

*Opettajaksi tulee Oriveden kurssilta tuttu Gražina Opulskienė. Ohjelmassa on opetusta päivittäin 5-6 tuntia ja opiskelijat jakautuvat ryhmiin taitojensa mukaan. Kieleen vasta tutustuvat aloittavat alkeista ja jatkoryhmä syventää*

*kielitaitoaan. Kansainvälistä kieltä käytetään totta kai myös vapaa-aikana, jolloin mm. osallistumme maatalon töihin ja tutustumme paikkakunnan nähtävyyksiin yhdessä.*

*Kurssipaikka Nerkonniemen kylätalo sijaitsee lähellä Iisalmen Esperantoklubin puheenjohtajan Onni Kauppinen maatilaa.*

*Kurssimaksu on 55 €/vuorokausi, jos yöpyy Onnin maatilalla yhteismajoitukses-*



Iisalmi de supre, Foto: RB



sa (osin teltassa). Jos valitsee muun yöpymispaikan (esim. hotellin Iisalmessa) maksu on 40 €/vrk. Kumpaankin maksuun kuuluu opetus, ruokailut, retkikulut pääosin sekä kuljetukset Iisalmesta kurssipaikalle ja takaisin.

Ilmoittautumiset Suomen Esperantoliiton sihteerialle: Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, tel. +358 50 549 4709. Lisätietoja kurssista antaa myös Onni Kauppinen, tel. +358 500 813 530.

Kurssimaksu maksetaan joko käteisellä paikan päällä tai EAF:n tilille (kysy viitenumero sihteeriltä). Kurssiohjelma julkaistaan liiton nettisivuilla sekä seuraavissa lehdissä ensi vuonna.

Bonvenon al Iisalmi! Tervetuloa Iisalmeen!

Onni, Gražina kaj Tiina

## Blinduloj kongresis en Italio la 22-an – 29-an de aŭgusto

La estraro de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) klopodis aranĝi IKBE-on en Francio, kie okazis la 100-a UK. La afero ne sukcesis. Dank' al la Itala Esperanto-Federacio la 81-a IKBE okazis enkadre de la 82-a Itala Esperantokongreso en *San Benedetto del Tronto* ĉe la meza adriatika marbordo. La blindulkongreso allogis 63 partoprenantojn el 13 landoj, inter ili 2 el Finnlando. La plej foraj venis el Brazilo kaj Japanio.

La blinduloj rajtis kongresi ĉe favoraj kondiĉoj. La ĉefaj temoj de la itala kongreso estis "Kultura tutmondiĝo: limoj kaj perspektivoj" kaj "La originala literaturo en Esperanto". La programo estis abunda. Klerigaj kaj distraj programeroj plenigis la tagojn. Por la junaj (kaj eksjunaj) nedormemuloj estis ankaŭ noktaj programeroj.

Malavantaĝo estis, ke IKBE-anoj loĝis en ok hoteloj je ege variaj distancoj, eĉ malproksime de la kongresejo. Kulpas la loka turisma agentejo, kiu reprenis la disponigitajn lokojn en unu hotelo kaj anstataŭigis ilin per la sama nombro, sed dise tra la urbo. Kompense la urbaj trafikiloj estis senpagaj por kongresanoj.

La programo de la 81-a IKBE konsistis el la ĝenerala asembleo kaj tuttaga eksurso, dum kiu la kongresanoj vizitis i. a. la palpsentan muzeon Omero en *Ancona* kaj la katedralon de *Loreto*. Malmultaj blinduloj partoprenis la vesperan

kunestadon post la ekskurso. S-ino *KIKUSIMA Kazuko* ("Krizantemo") aranĝis speciale por blinduloj prezentadon de "Sorobano", la japana formo de la globalkalkulilo abako. Sub gvido de s-ino *MARKARIAN Kimie* kvin blinduloj konatiĝis kun diversaj kalkuliloj.

La venonta IKBE estas planata okazi tuj post la 101-a UK en Nitra (Slovakio). La itala kongreso de Esperanto okazos la 20-an – 27-an de aŭgusto en *Frascati* (Roma) kun la temo "Instruado de lingvoj en eŭropaj lernejoj".

Ritva Sabelli

### Kongresa limeriko

En San Benedetto del Tronto  
okazis blindula renkonto;  
Sed ĉe la loĝig'  
ekestis disig'  
de l'aro en ok,  
Kia honto!

**Otto Prytz**  
(Norvegio)

## Leĝeraj eroj pri lingva hobiado

En mia librokolekto estas kvar diverslingvaj versioj de la romano "Sep Fratoj". La lingvoj estas: la sveda, angla, esperanta kaj estona. La menciita ĉefverko "Seitsemän Veljestä" de *Aleksis Kivi* (1834–1872) aperis en la finna lingvo 1870. Ĝis nun oni eldonis proksimume tridek tradukojn.

Estis al mi malfacile trovi la estonan tradukon de *Friedebert Tuglas* sub la nomo "Seit-se Venda" de la jaro 1966. Belege kaj kortuŝe helpis *Lydia Lindla* en Tartu kaj *Vjaceslav Hromow* en *Kuressaare*. Por ambaŭ tutkoran dankon pro ilia valora donaco.

Koncize oni povas esprimi, ke ĉiuj tradukoj estas sukcesaj kaj altkvalitaj. Tre precize sian taskon plenumis la jam forpasinta *Ilmari Ekström* laŭenhave kaj stile. Mia samklubano li estis en Turku. La vidvino enmanigis al mi la Esperanto-vortaron de *Kabe* eldonitan en Francio 1911. Ornamas la verkon bela "Ex-libris" de la posedinto. UEA-delegito, diplomita inĝeniero Ekström aĉetis 1912 la libron, kiu nun estas mia trezoro.

Indas tuj doni ekzemplon pri tiklaj esprimmanieroj. Ekström fidele ripetas la originalon per tri vortoj: "Ondadis dikspika greno". Kivi mem skribis poeziume kaj flue: "Aaltoili teräinen vilja." *Richard J. Impola* interpretis la koncernan tekston jene: "Full heads of grain once rippled in the wind." Okulfrape pli longa estas la angla ekvivalento kun naŭ vortetoj. Impola ĝuste kaj klare tradukas, sed mi admiras la esprimkapablon de mia gepatra lingvo. Grandan plezuron donas kompara legado de diversaj tradukoj.

La estona lingvo estas tute fremda al mi. Sed en la teksto de "Seit-se Venda" finno trovas multajn konatajn kaj tuj kompreneblajn vortojn. Tio faras la literaturan esplorvojaĝon tre altira. Kiam la estona prezidento parolas publike sian lingvon, mi komprenas nenion. Surstrate en

Tallinn mi kapablas kompreni ĝi en simplaj aferoj. La komence prezentitaj ekzemploj helpas legantojn facile kapti la esencan enhavon de la estonlingva frazeto "Lainetas terarohke vili." Terarohke postulas analizeton kun la vortaro. *Jaana Ojalo* solvas la enigmon simple: abunda grajnero. Friedebert Tuglas kompreneble majstre regas la estonan lingvon. Ankaŭ nekonanto de la lingvo sentas tion lige kun lia traduko.

*Elmer Diktonius* gvidas nin en la svedlingvan tradukon, kiu perfekte kaj flue kuras tra la tuta romano. Antaŭ multaj jaroj la konata finna astronomo kaj esperantistino *Liisi Oterma* (1915–2001) en Turku rekomendis al mi aboni kaj legi ĉiutage la plej aĝan ankoraŭ aperantan gazeton en Finnlando "Åbo Underrättelser". Tuj mi kaptis ŝian ideon kaj jam 25 jarojn mi legadis ĝin. Neniel mi havas la senton, ke mi regas la lingvon. Tute kontraŭe. Plej freŝa por mi nova esprimo en la sveda estas "trixa med lönerna".

Dum la lernejoj jaroj mia instruisto de la sveda lingvo "vipis" siajn lernantojn en knaba liceo dum la kvardekaj jaroj vere krule. Sed li ne sukcesis estingi mian studemon. La lingvon mi ŝatas kaj ĉiutage mi ion legas en ĝi. Nune multaj ignoras la duan enlandan lingvon en Finnlando. Tamen al mi ĝi estas plaĉa kaj ŝatinda, eĉ korproksima. Mia parolkapablo estas mizera, sed eble miaj legadekzercoj subtenis relative facilan digestadon de la libro "Sju Bröder".

Akceptu jen mian modestan kontribuon. Rakontu ankaŭ vi iam pri sperto koncerne lingvan hobiadon. Indas prezenti laikajn aventurojn en lingva medio de ordinaraĵoj civitanoj. Estas tempo por fini kaj atendi raportetojn de aliuloj.

Amike,  
*Jorma Ahomäki, Piispanristi*

## Rezultoj de la 2-a Muzika Konkurso de la revuo Kontakto

*Martin & La Talpoj* kaj *La Perdita Generacio* estas la venkintoj en la kategorio "Kanto de la Jaro" de la 2-a Muzika Konkurso de Kontakto. *La Princino*, de Martin & La Talpoj ricevis la 1-an lokon kaj *La 100-a Fojo* de La Perdita Generacio ricevis la 2-an lokon en la voĉdonado farita de la ĵurio.

La venkinto en kategorio "Premio de la Publika" estas la kanto "Tiu Brakumo Unika" de *Lucio Avitabile* kaj *Roberto Pigro*, kiu ankaŭ venkis la premion "Nova Talento". Estis enkalkulitaj entute 196 voĉdonoj por la "Premio de la Publika". Partoprenis 14 konkursaĵoj el diversaj stiloj kaj el diversaj landoj, kiuj estis aŭskultitaj 7900 fojojn.

Kelkaj konkursantoj partoprenis la duan fojon per novaj kantoj (La Perdita Generacio, kiu venkis pasintjare en "Kanto de la Jaro" kaj "Premio de la publika", *Sepa kaj Asorti*, Roberto Pigro kaj *SoNori*) kaj aliaj konataj muzikistoj partoprenas la unuan fojon (*Flávio Fonseca*, *Ĵomart* kaj *Nataša* kaj *Martin Wiese*). Ankaŭ novaj artistoj kaj pli amatoraj muzikistoj volas konigi al la esperantistaro sian arton, kiel ekzemple *Maragan'*, *SoNori* kaj *Tiu Ne Gravas*.

La konkurso ĉi-jare proponis premiojn por tri kategorioj: Kanto de la Jaro, Premio de la pub-

lika kaj Nova Talento. La unua loko por la Kanto de la Jaro ricevas 200 €, la dua loko 100 €, la Premio de la Publika 100 € kaj Nova Talento premias unu konkursaĵon per 100 €. Ĉiuj premiitoj devas ricevi diplomon/ateston.

La ĵurio en 2015 konsistis el: *Barbara Pietrzak* – Pollando [radio-ĵurnalisto, Estrarano de UEA pri kulturo], *Stano Marček* – Slovakio [instruisto, eldonisto, membro de la Akademio de Esperanto], *Kim J. Henriksen* – Danio [muzikisto], *Szilvási László* – Hungario [entreprenisto, ĵurnalisto], *Juliana Evandro* – Brazilo [TEJO-estrarano pri kulturo].

La Muzika Konkurso de Kontakto estas organizita de la revuo Kontakto kaj de la kultura komisiono de TEJO, kun financa apogo de UEA kaj disvastiga helpo de EUROKKA. Ĝi realiĝis unuafoje en 2014 kaj naskiĝis kun la celo pleniĝi la truon, kiun lasis la forlaso de la branĉo "Muziko" el la Belartaj Konkursoj de UEA en 2011.

Ĉiuj konkursaĵoj aŭskulteblas ĉe: <https://soundcloud.com/revuo-kontakto/sets/2-muzika-konkurso-de-kontakto-2015>

[Laŭ gazetara komunikado de TEJO/Kontakto]

## Esperanto-kantoj per Saaremaa Radio KADI

Ĉi-jare en septembro la Estona Radiostacio KADI ([www.kadi.ee](http://www.kadi.ee)) en *Kuressaare* [Arensburgo] ebligis muzikajn elsendojn de E-kantoj en kadre de la programoj por naskiĝtagosalutoj al aŭskultantoj. La unuaj salutitaj aŭskultantoj estis la esperantistinoj *Helgi Hromova* kaj *Virve Ernits* el *Kuressaare*.

La radio-programoj estas bone aŭdeblaj regule je la tria horo posttagmeze laŭ la loka tempo

kaj povas esti ricevataj sur la Estonaj insuloj kaj urboj *Pärnu*, *Virtsu* kaj *Haapsalu*.

Radio KADI havas riĉajn programerojn ĝenerale kaj informplenajn disaŭdigojn.

Provu aŭskulti E-kantojn sur la ondoj de Radio KADI!

*Sukceson!*

*Vjaceslav Hromov*  
*Kuressaare, Estonio*

# Vintraj Tagoj 2016 en Hämeenlinna – Talvipäivät 2016 Hämeenlinnassa 12.–13.3.2016

**Kunvenejo:** Komundomo, Kirjastokatu 1  
**Kokouspaikka:** Kumppanuustalo, Kirjastokatu 1

**Sur la spuroj de Jean Sibelius en Hämeenlinna,  
Jean Sibeliuksen jalanjäljillä Hämeenlinnassa**

## **PROGRAMO – OHJELMA** (ŝanĝoj eblas - muutokset mahdollisia)

### **SABATO / LAUNTAI 12.3.2016**

- 9.00–11.00 .... Kunvenoj de membroasocioj de EAF laŭ alvokoj (i.a. ELFI). *Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöjen kokouksia (mm. ELFI).*
- 11.00–12.30 .. Lunĉo proprakoste. *Lounas omatoimisesti.*
- 12.30–13.00 .. Akceptejoj malferma. Libroservo. *Ilmoittautuminen Kumppanuustalossa. Esperantotavaroiden myyntipalvelu.*
- 13.00–15.00 .. Malfermo de la tagoj. Publika prelego pri *Jean Sibelius* ĉefe finnlingve (en auditorio de la kunvenejo). *Päivien avaus. Sibelius-aiheinen yleisöluento auditoriossa suomeksi, kerrotaan myös talon historiasta.*
- 15.00–15.30 .. Kafo/teo. *Kahvi/tee.*
- 15.30–17.30 .. Jarkunveno de EAF (komence kontrolo de rajtigiloj). *Suomen Esperantoliiton vuosikokous (aluksi valtakirjojen tarkastus).*
- 17.30–18.00 .. Libera kunestado. Libroservo. *Vapaata yhdessäoloa. Esperantotavaroiden basaari.*
- 18.00–19.00 .. Vesperumo: Orienta dancgrupo *Tanssin Lumo* (ĉarmo de dancado) kaj magiisto. *Illanvietossa itämainen tanssiryhmä Tanssin Lumo ja taikuri-esitys.*
- 19.30–21.00 .. Vespermanĝo en restoracio *Piparkakkutalo*, Spickuketodomo, laŭ mendoj (proprakoste). *Yhteinen illallinen ravintola Piparkakkutalossa etukäteistilausten mukaan (omakustanteisesti).*

### **DIMANĈO / SUNNUNTAI 13.3.2016**

- 9.30–12.30 .... Piedirado sur pasoj de *Jean Sibelius*. Kolektado ĉe la ĉefa preĝejo de Hämeenlinna (adreso: Kirkkorinne), rapida vizito en la preĝejo. Piediradon gvidas la membroj de Hämeenlinna-grupo esperante kaj finne. En la fino ĉiĉeronata vizito (esperanta traduko) en la naskiĝdomo de Sibelius, kiu nun estas muzeo. *Kävelykierros hämeenlinalaisten kanssa Sibeliuksen poluilla – löydä Sibeliuksen elämän tärkeät paikat. Lähtö Hämeenlinnan pääkirkolta (os. Kirkkorinne), lyhyt vierailu kirkossa. Kävelyn lopuksi opastettu kierros Sibeliuksen syntymäkoti -museossa (os. Hallituskatu 11).*
- 12.30–14.00 .. Lunĉo en la restoracio *Wanha Pankki*, Malnova Banko, en la urbocentro proprakoste (antaŭmendoj). Adiaŭaj vortoj. *Päätöslounas ravintola Wanhassa Pankissa (Raati-huoneenkatu 10) omakustanteisesti (etukäteistilaus). Päätössanat.*
- 14.00– ..... Bonan hejmenvojaĝon! *Hyvää kotimatkaa!*

Vintraj Tagoj de EAF okazos venontmarte en la naskiĝurbo de *Jean Sibelius*. Sibelius estis kaj estas la plej fama kaj internacie konata komponisto de nia lando. Dum la semajnfino 12.–13.3.2016 ni konatiĝos kun la spuroj de Janne en liaj junaj jaroj kaj nin gvidos la aktiva virina esperantogrupo de la urbo Hämeenlinna. Sed ne nur faktoj pri Sibelius estas en nia programo: nin amuzos ankaŭ orienta danĉogrupo kaj juna magiisto.

La jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos sabate post la publika prelego en nia kunvenejo Komundomo (finne: Kumppanuustalo). Venu por decidi pri la nunaj kaj estontaj aferoj de la Asocio. Post vesperumo en la kunvenejo, tiuj kiuj deziras povos vespermanĝi en ĉarma restoracio *Spickuketdomo* (finne: *Piparkakkutalo*). Dimanĉe ni unue piediros en la urbo sur spuroj de la majstro kaj poste vizitos lian naskiĝdomon, nuntempa muzeo. La vizito en la muzeo estos ĉiĉeronata finne kaj tradukita esperanten. Fine ni kolektiĝos por lunĉo en la restoracio *Malnova Banko* (finne: *Wanha Pankki*).

*Seuraavat talvipäivät 12.–13.3.2016 vievät meidät nuoren Sibeliuksen maisemiin Hämeenlinnassa. Kuulemme hänestä sekä yleisöluennolla että kävelyretkellä, jonka yhteydessä käymme myös syntymäkoti-museossa. Ja yhteistyössä aktiivisen hämeenlinalaisen esperantistiryhmän kanssa tehdyssä ohjelmassa on muutakin: Tanssin Lumo -ryhmä esittää meille itämaista ja intialaista tanssia ja näemme myös nuoren taikurin taikatemppeja. Suomen Esperantoliiton vuosikokous pidetään lauantaina 12.3. yleisöluennon jälkeen Kumppanuustalon kokoustilassa. Tule päättämään yhdistyksen asioista niin nyt kuin tulevaisuudessa. Kokouksen ja iltaohjelman jälkeen ne, jotka haluavat voivat lähteä illalliselle viehättävään Piparkakkutalo-ravintolaan (etukäteistilaus tarpeen). Sunnuntaina kävelemme hämeenlinalaisten johdolla Jannen jalanjäljissä ja vierailemme museossa. Kierroksen jälkeen on lounas halukaille ravintola Wanhassa Pankissa. ►►*

## ALIĜILO



Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF  
12.–13.3.2016 en Hämeenlinna.

Nomo: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Tel./Ret-adreso: \_\_\_\_\_

### Partoprenkotizo

La kotizo inkluzivas programojn ambaŭtage (ankaŭ muzean viziton) kaj kafon sabate.

39 € . . . . . ĝis 20.2.2016 \_\_\_\_\_

45 € . . . . . post 20.2.2016 \_\_\_\_\_

25 € por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo.

**Vespermanĝo sabate en Ravintola Piparkakkutalo** (ĉ. 30 €): \_\_\_\_\_

(pago surloke, aliĝu por rezervado de lokoj, ni informos pri menuo)

**Lunĉo dimanĉe en Ravintola Wanha Pankki** (ĉ. 15 €): \_\_\_\_\_

(pago surloke, aliĝu por rezervado de lokoj, ni informos pri menuo)

**Entute pagenda al la konto de EAF:** \_\_\_\_\_

Pagoj al la konto: Helsingin Osuuspankki  
FI82 5721 1520 2859 38.

Bv. uzi la VT-referencnumero **4640** (ne skribu aliajn informojn en la pagilo).

**Pliaj informoj aŭ deziroj aŭ demandoj:**

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

**Bonvolu sendi la aliĝilon al:**

Esperanto-Asocio de Finnlando  
Siltasaarekatu 15 C 65,  
FI-00530 Helsinki.

Retaj aliĝoj tra [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

**Bonvenon!**





# ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville  
12.–13.3.2016 (Kumppanuustalo, Kirjastokatu 1,  
Hämeenlinna)

**Nimi:** \_\_\_\_\_

**Osoite:** \_\_\_\_\_

**Puh./sähköposti:** \_\_\_\_\_

## Osallistumismaksu

Maksu sisältää viikonlopun ohjelmat (myös  
museonkäynnin) sekä kahvin lauantaina.

39 € . . . . . 20.2.2016 asti \_\_\_\_\_

45 € . . . . . 20.2.2016 jälkeen \_\_\_\_\_

25 € FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua  
alle 15-vuotiaat lapset.

## Illallinen lauantaina, Ravintola Piparkakkutalo

(noin 30 €): \_\_\_\_\_

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää  
varten, ilmoitamme menusta erikseen)

## Lounas sunnuntaina, Ravintola Wanha Pankki

(noin 15 €): \_\_\_\_\_

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää  
varten, ilmoitamme menusta erikseen)

## Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton

tilille: \_\_\_\_\_

Tilinumero: Helsingin Osuuspankki

FI82 5721 1520 2859 38.

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite-  
tai viestikenttään maksun yhteydessä).

## Lisätietoja, toivomuksia ja/tai kysymyksiä:

\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

## Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto

Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

**Tervetuloa!**



## Venontaj

### Aliğoj kaj kontaktopersonoj

Vi povas aliği aŭ sendante per poŝto la apu-  
dan aliğilon al EAF aŭ retpoŝte al la adreso  
[eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi) kaj pagante la koncer-  
najn pagojn al la konto de EAF. Memoru uzi  
la referenc-numeron **4640** sen indiki temon de  
la pago. Bonvolu noti, ke ne sufičas nur sendi  
la pagon al la konto, ĉar ni bezonas krome scii  
kiujn programerojn vi partoprenos. Ni mendos  
la muzean viziton kaj la vespermanĝon sabate  
kaj lunĉon dimanĉe laŭ aliğoj (vidu aliğilon).  
Pli proksime ni informos pri la pladoj de la me-  
nuo. Ĉiu partoprenanto aranĝu kaj pagu mem-  
sian tranoktadon kaj eventualan lunĉon sa-  
bate. Ekzistas sufiĉe multaj kaj tranoktaj kaj  
manĝejaj alternativoj proksime al la kunvenejo,  
kiu situas en la urbocentro. Hämeenlinna-anoj  
volonte donos pliajn informojn laŭbezone.

Vi povas demandi koncernajn aferojn de EAF  
aŭ de la lokaj esperantistoj jene: la oficialaj kun-  
venoj: *Tuomo Grundström* (EAF) kaj *Tiina Oit-  
tinen*, programaj aferoj: *Tiina Oittinen* (EAF)  
aŭ *Marjatta Niemi*, monaferoj: *Tiina Kosunen*  
(EAF), alveno al Hämeenlinna, tranoktado kaj  
restoracioj: *Marjatta Niemi* aŭ *Kati Lindell*.

Kontaktinformoj de hämeenlinna-anoj:  
Marjatta Niemi, [marjatta.laimani@gmail.com](mailto:marjatta.laimani@gmail.com),  
tel. 050 567 8690 kaj Kati Lindell, [kalendulo@  
gmail.com](mailto:kalendulo@gmail.com), tel. 050 545 7690.

La kontaktoinformojn de funkciuloj de EAF  
vi trovas sur la paĝo 2.

Pli detalaj informoj pri la programo aperos  
en Esperantolehti 1/2016 kaj sur la retpaĝoj  
[www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi).

### Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu lähettämällä oheinen lomake Suo-  
men Esperantoliittoon tai samat tiedot sähkö-  
postilla osoitteeseen [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)  
sekä maksamalla vastaavat maksut liiton tilil-

le. Muista käyttää viitenumeroa **4640**, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita viite- tai viestitietoja. Huomaa, että pelkkä maksun lähettäminen ei riitä, sillä tarvitaan myös tiedot siitä, miten olet osallistumassa ohjelmaan. Paikat illalliselle lauantaina ja lounaalle sunnuntaina varaamme ennakoilmoittautumisen mukaan, lähempänä päiviä ilmoitamme vielä menuvaihtoehtoja. On myös tarpeen tietää sunnuntaina museokäynnille osallistuvat, sisäänpääsymaksu kuuluu ohjelmaan. Majoituksen ja mahdollisen lounaan lauantaina jokainen järjestää ja maksaa erikseen. Hämeenlinnassa on useita majoitus- ja lounaspaikkoja keskustassa sijaitsevan kokouspaikan läheisyydessä. Paikallisilta yhteyshenkilöiltä saat opastusta tarvittaessa.

Talvipäiviin liittyviä asioita voi tiedustella liiton toimihenkilöiltä tai hämeenlinnalaisilta seuraavasti: liiton vuosikokous ja muiden kokousten järjestäminen: Tuomo Grundström ja

Tiina Oittinen, ohjelmatiedot: Tiina Oittinen ja Marjatta Niemi, raha-asiat: Tiina Kosunen. Hämeenlinnaan tuloon, majoittumiseen sekä ruokailuihin liittyvät asiat: Marjatta Niemi ja Kati Lindell.

Hämeenlinnalaisten yhteystiedot: Marjatta Niemi, marjatta.laimani@gmail.com, puh. 050 567 8690 ja Kati Lindell, kalendulo@gmail.com, puh. 050 545 7690.

Liiton toimihenkilöiden yhteystiedot ovat lehden sivulla 2. Tarkempia ohjelmatietoja on seuraavassa Esperantolehdessä. Seuraa myös tiedotusta liiton verkkosivuilla [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi).

**Bonvenon en Hämeenlinna!  
Tervetuloa Hämeenlinnaan!**

*Esperanto-Asocio de Finnlando  
kaj la esperantogrupo en Hämeenlinna*

## Alvoko al la jarkunsido

La laŭstatata jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos sabaton, la 12-an de marto 2016 je la 15.30 horo en Hämeenlinna, en la kunvenejo de Kumppanuustalo (Ko-

mundomo), adreso: Kirjastokatu 1, 13100 Hämeenlinna. En la kunveno estos traktitaj la laŭstatataj jarkunvenaj aferoj.

*La estraro*

## Vuosikokouskutsu

Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään lauantaina 12.3.2016 klo 15.30 alkaen Hämeenlinnassa, Hämeenlinnan Kumppanuustalossa,

osoite: Kirjastokatu 1, 13100 Hämeenlinna. Kokouksessa käsitellään liiton sääntömääräiset vuosikokousasiat.

*Hallitus*

## Kallelse till årsmöte

Esperantoförbundet i Finland håller sitt stad-geenliga årsmöte lördagen den 12.3.2016 kl. 15.30 i Tavastehus. Adressen är: Hämeenlinnan Kumppanuustalo, Kirjastoka-

tu 1, 13100 Hämeenlinna. Mötet behandlar de i förbundets stadgar föreskrivna årsmötesärendena.

*Styrelsen*

## Sibelius kaj Hämeenlinna

En decembro 2015 pasos 150 jaroj de la naskiĝo de Sibelius. La jubilean jaron oni celebras plurloke en Finnlando kaj eksterlande. Hämeenlinna (svede *Tavastehus*), la naskiĝurbo de Sibelius, diligente okazigas diversajn eventojn. Multaj asocioj, la urbo kaj la organizo "Sibelius Celebrations" primemoras la komponiston per pli ol 80 koncertoj kaj aliaj eventoj.

Sibelius naskiĝis en Hämeenlinna la 8-an de decembro en 1865. Li estis la meza el tri gefratoj. Dujara li perdis sian patron, kiu laboris kiel la urba kuracisto. Post la morto de la edzo la vidvino falis en ekonomiajn malfacilaĵojn. Ŝi kaj la infanoj devis translokiĝi el la familia hejmo al tiu de ŝia patrino.

Unue Sibelius vizitadis finnlingvan elementan lernejon, poste la Normalliceon de Hämeen-



La domo kie Sibelius loĝis kiel lerneĵano (jam mal-konstruita).  
Foto: Matti Parkkonen



La naskiĝejo de Sibelius en Hämeenlinna. Foto: Saliko

linna. En la urbo eblis abituri nur finnlingve, kaj tiel la filo de svedlingva familio edukiĝis du-lingva. Li loĝis rande de la tiama Tähtipuisto (Steloparko), kiu nuntempe nomiĝas Sibelius-parko kaj apudas Sibelius-straton. Tie Sibelius pasigis plejparton de siaj dudek Hämeenlinna-jaroj. La domo, kie li loĝis dum lerneĵaj jaroj, estis malkonstruita en la 1980-aj. Siatempe sur la muro de la domo videblis memorŝildo, ke Sibelius tie loĝis ekde la jaro 1867 ĝis sia translokiĝo al Helsinko, kie li, post la abiturientiĝo (1885), daŭrigis siajn studojn en la Universitato. Japanaj turistoj, vidante la memorŝildon, kredis, ke la domo estas muzeo, oftege eniris kaj konfuziĝis ne trovante muzeon malgraŭ la memorŝildo.

En 2014 la Sibelius-parko estis refarita por la jubilea jaro. Oni instalas muzikajn benkojn, sur kiujn eksidante oni povas aŭdi i.a. la komponaĵojn "Betulo kaj Piceo". Meze de la parko versimila statuo, skulptita de *Kain Tapper* en 1964, prezentas la junan sveltan Sibelius.

En la junaĝo al Sibelius ne eblis vojaĝadi eksterlande, kie li povus aŭdi novan muzikon kaj akiri novajn muziknotojn. Tamen eĉ en sia naskiĝurbeto li aŭdis surprize abundan kaj diversan muzikon.

Pluraj tiamaj "steloj" vizitadis la urbeton por tie koncerti. Estis facile trajni tien de Helsinko laŭ la unua finnlanda fervojo Helsinki – Hämeenlinna, kiu estis finkonstruita en 1862. En Hämeenlinna troviĝis granda interesata aŭskultantaro, la tiutempa klerularo, i.a. oficistoj de la gubernia estrejo kaj alt-rangaj soldatoj el la garnizono.

Ekde sia junaĝo Sibelius alkutimiĝis al ludado kun la



hejma ĉambro-orkestreto. Unue li ludis pianon, poste violonon. Lia fratino, la plej aĝa el la gefratoj, pianludis, kaj lia frato ludis violonĉelon. Tial kaj tiel Sibelius en frua aĝo jam ekrlatis kun muziko. Kvankam la parencaro helpis la familion, Sibelius longe sentis sin malhavulo kaj eksterulo. Malgraŭ tio li neniam montris al aliaj siajn monproblemojn sed ĉiam vestis sin elegante, provizante sin per ŝikaj kostumoj kaj akcesoraĵoj, kvankam fakte li sidis en ŝuldoj ĝis super la ŝultroj.

La familio insistis, ke post la abiturientiĝo Sibelius ekstudu en la Universitato de Helsinko. Komponado kaj muziko ne estis konsiderataj deca profesio. Tre rapide tamen Sibelius forlasis la studadon en la jurofako por dediĉi sin al tuttaga muzikstudado. Lia talento estis rimarkita, kaj per stipendioj oni subtenadis lin. Tiel li povis vojaĝi eksterlanden, ekzemple al Berlino kaj Vieno. Tamen en liaj komponaĵoj ĉiam funde sonis la finna naturo de la hejmurbo, ĝiaj parkoj kaj la nefora parkoarbarto *Aulanko*. Kiel knabo kaj junulo li ja estis influita kaj imponita de ĝi, kiam li enarbare vagadis kun iom da musko en la poŝo kaj violono preta ĉemane. Tiun influon la plenkreska Sibelius mem agnoskis.

*Marjatta Niemi*



La Juna Sibelius antaŭ la Liceo de Hämeenlinna, en la nuntempa Sibelius-parko. Skulptisto Kain Tapper, 1964. Foto: Saliko



La unua medalo pri Sibelius de la jaro 1915. Skulptisto Ville Vallgren. Foto: Marjatta Niemi

## Esperantolehti rete kaj arkive

Esperantolehti estas membro de la Finnlanda asocio por kulturaj periodaĵoj, *Kultti ry*. Tie estas informoj pri Esperantolehti kun kovriloj de aperintaj numeroj. Vidu la retpaĝon *www.kultti.net* kaj tie trovu Esperantolehti laŭ la nomo per serĉilo; ni aperigas kelkfoje ankaŭ nian finlingvan materialon sur la paĝoj de Kultti. Eblas ankaŭ aboni EL – kaj kiun ajn el la ĉ. 170 membro-gazetoj pere de Kultti.

En la retpaĝo de EAF (*www.esperanto.fi*) troviĝas numeroj de jarkolektoj 2010–13 de EL legeblaj; la arkivo estas kompletigata. Elektitaj artikoloj estas ankaŭ aparte en la paĝoj. Kaj ni ne forgesu, ke EAF ankaŭ troviĝas en *www.facebook.com* (aŭ "Vizaĝejo").

Vizitu la paĝojn kaj sendu ligilojn, rekomendu al amikoj por nin konigi!

# Klubo la Amikoj de Esperanto

Mallonge KAE. Tian nomon miaj Esperanto-amikoj en nordorienta Kongolando elektis por sia klubo. Ilia agado tre diferencas de nia agado en Finnlando. Jen kelkaj iliaj projektoj kaj revoj:

- Disvastigi sciojn pri Esperanto kaj zamenhofaj idealoj
- Lernejo por orfoj,
- Esperanto-kursoj,
- lerneja biblioteko
- Kiliba Pura Vilaĝo, kolektado de rubaĵoj, reciklado
- Arbarigo de la ĉirkaŭaĵo, kiun oni senarbarigis pro bezono de konstru- kaj brulligno
- Lerni el la spertoj de aliaj landoj
- Mikrokreditoj de 50 dolaroj al virinoj
- Kultivado de heredita tero por nutri ankaŭ la orfojn

La ĉefaj motoroj en la projektoj nomiĝas *Mana Namutema Brinson* kaj lia edzino *Paskalino*. Ili en sia malgranda hejmo (6m x 9m) zorgas pri dudeko da senhejmaj georfoj. La hejmo havas 2 dormoĉambrojn kaj tagĉambreton. Kelkaj infanoj dormas en dormejoj ĉe la lernejo. Ĝus estis aĉetitaj litoj, matracoj kaj litaĵoj, por ke deniu dormu surplanke. Nun la infanoj dormas duope, la litoj nombras dek. La lernejo havas 3 lernoĉambrojn kaj la biblioteko ĉ. 300 Esperantajn libr(et)ojn. La kultivado de la 5-hektara agraro apenaŭ povas nutri la grandan "familion". Mana kultivas i.a. rizon, maizon, tomatojn, batatojn, ternuksojn, ajlon, maniokon. Parton de la rikolto ili vendas por aĉeti sukeron, oleon, sapon, vestaĵojn, ŝuojn, ĉapelojn (uzitajn!), medikamentojn, sanoserv-



La orfaro, fotoj: Mana N. Brinson



Paskalino

ojn kaj por la lernejo skribilojn, kretojn ktp.

KAE jam aĉetis dekon da ĉarumoj, kiujn ili ne nur mem uzas sed luigas por porti aĵojn al/ de la kampoj. Antaŭe ĉio estis portata surdorse. Per la mikrokreditoj virinoj sukcesas iom lukri bredante kokinojn, kaprinojn, kolombojn, kuniklojn kaj kultivante peceton da tero. Ili komencas pagi lernejkostojn de siaj infanoj, iom post iom ili sukcesas repagi la krediton. KAE zorgeme elektas la personojn, al kiuj ĝi pruntas monon, kaj la orfojn, kiujn ĝi edukas.


Eble vi miras, kial la orfaro estas tiel multnombra. Kaŭzas tion militoj, malsanoj, malsato kaj AIDOSO. Gepatroj mortas, geavoj estas tro malriĉaj aŭ malsanaj por zorgi pri infanoj. La averaĝa vivodaŭro estas 45–55 jarojn. Kelkaj plenkreskuloj rifuĝas alikontinenten por serĉi pli bonan vivon. Ĉu nur por droni en la maro? Gejunuloj sekvas siajn seksajn dezirojn sen zorgi pri eventuala gravediĝo. Novnaskiton la patrino povas lasi kien ajn, eĉ en necesejon, por atendi kompateman vizitonton. Mana Brinson kolektis sian orfaron en la stratoj. Li nutras kaj vestas ilin, edukas ilin pri amo kaj paco, instruas Esperanton, kiun li kiel infano eklernis en iu rifuĝejo. KAE havas ankaŭ nesolveblajn problemojn. Daŭra manko de rimedoj, manko de regulaj donacantoj. La bezonoj kaj revoj estas grandaj, la fortoj de unu geedza paro ne



Ĉarumoj

ĉiam sufiĉas. Iom da helpo, ekz. libroj por pa lerneja biblioteko, venis de Finnlando. Pli da helpo venis de kuracisto en la movado *Kuracistoj sen limoj*. Venis komputilo de iu lando, fotilo de alia. Tio estas eretoj en granda klopodado. Se vi interesiĝas, kontaktiĝu kun [mana.esperanto.brinson@gmail.com](mailto:mana.esperanto.brinson@gmail.com) aŭ kun [saliko@kase.fi](mailto:saliko@kase.fi).

Raita Pyhälä



# Zamenhof-Tago 2015



La Zamenhofa Tago (15-a de decembro) estas la naskiĝtago de *L. L. Zamenhof* (1859–1917), la iniciatinto de Esperanto, kaj la plej vaste celebrata festotago en la Esperanto-kulturo. En tiu tago (aŭ en alia konvena semajntago ĉirkaŭ ĝi) esperantistoj tra la mondo okazigas specialajn renkontiĝojn por festi la okazon. La ideo de Esperanto kaj la proksimeco de la Zamenhofa Tago al Kristnasko instigas la kunvenintojn interŝanĝadi donacojn (prefere librojn verkitajn en Esperanto) kaj bondezirojn. Kompreneble okazas dum tiaj kunvenoj ankaŭ prelegoj pri *L. L. Zamenhof*.

Laŭ iniciato de unu el niaj plej signifaj verkistoj, *Julio Baghy*, ni festas je la 15-a de decembro ankaŭ la Esperantan kulturon. Por la plialtigo de la spirita nivelo de la esperantistaro, Baghy proponis (Publika letero, 1931), ke la Zamenhof-Tago estu ankaŭ la tago de la Esperanta libro, Esperanto-literaturo, kulturo. Ni kuraĝigas lokajn grupojn, Landajn Asociojn de UEA, unuopulojn, okazigi renkontiĝojn, prelegojn dum tiu tago, ankaŭ publikajn al ne-esperantistoj. En tiun programon enmetu libro-recenzon aŭ poem-deklamadon, anoncu aperon de novaj esperantaj libroj. Legemuloj, kleriĝemuloj pri la esperantaj literaturo kaj kulturo aĉetu libron

aŭ komencu legadon de nova esperanta libro, ankaŭ per tio celebru la Esperanto-literaturon je tiu tago.

La 15-an de decembro okazas ĉiujare pluraj agadoj, ekzemple en tiu tago la urbestro de Bjalistoko inaŭguris novan Zamenhof-centron. En Novjorko okazis simpozio omaĝe al Zamenhof kun prelegoj de *Arika Okrent*, *Humphrey Tonkin* kaj aliaj profesoroj. Unu jaron la serĉilo *Google* ornamis tiutage sian emblemon per la Esperanto-flago honore al la okazo (*Google Doodle*), kio igis proksimume 2 milionojn da personoj klaki ĝin kaj legi vikipedian artikolon pri Zamenhof aŭ Esperanto.

Ni invitas vin profiti la tagon ankaŭ por informi la neesperantistojn pri Esperanto.

Hodiaŭ ekzistas kaj plukreskas abunda, tutmonda esperanta literaturo (originala kaj tradukita), kiu same, kiel la lingvo mem celas disvastigi la diversajn kulturverkojn, kaj samtempe ebligi al alilingvanoj ĝui la verkojn de alietnaroj tiel kontribuante al justa, egalrajteca komunikado, kun respekto al lingva kaj kultura justecoj, riĉecoj, diverseco kaj strebante al la konservado de tiuj.

UEA

## Malferma Tago en Roterdamo: 43-a, lasta kaj unua de direktoroj



Generacia transdono en UEA jam prepariĝas kaj okazos post kelkaj monatoj. Emeritiĝas la direktoro de Centra Oficejo Osmo Buller kaj enoficiĝas Veronika Poór. (Foto de Clay Magalhaes en CO 28.11.2015)

Tio estis iniciato de *Osmo Buller* en 1994. Ne estas nur kafumado, babilado kaj libroserva perlokaptado, sed serioza programo. Prezentiĝis libroservo kaj tri verkistoj, Pola Retradio kaj *Povilas Jegerovas* pri la historio de Baltiaj Esperanto-Tagoj; interese pri problemoj kaj ties solvado dum la soveta reĝimo.

Kortuŝa estis la filmo "Reveno al Finnlando" pri pola militkaptito, kiu post kvindek jaroj revenas al Taivalkoski. La filmon produktis *Roman Dobrzynski* iniciate kaj helpe de Osmo en 1989.

Osmo prezentis la historion de sia hejma Rotterdam. Nin finnajn gastojn (kvar el preskaŭ cent vizitantoj) li en dimanĉo gvidis al julbazaro de la Finna Marista preĝejo. – Fine "OB respondis", resumis sian esperantan vivon sen promeso verki memuarojn...

*Tuomo Grundström*

*Leif Nordenstorm, Christer Lörnemark,  
Aleksandr Korženkov, Tuomo Grundström (toim.)*

TOHTORI ZAMENHOF JA KANSAINVÄLINEN KIELI  
YHTEISKIELEN LAATIJAN ELÄMÄ JAAATTEET:  
**ESPERANTO KIELENÄ JA KULTTUURI-ILMIÖNÄ**

*Joutulahjavihje ystävälle,  
jolle tahtoisi kertoa esperantosta:*  
**ZAMENHOFIN ELÄMÄKERTA**

**10 € + lähetykskulut**

**Tilaa osoitteesta:**  
*eafmendoj@esperanto.fi* tai  
Suomen Esperantoliitto,  
Siltasaarencatu 15 C 65,  
00530 Helsinki  
tai soittamalla 044 264 2742  
(puhelinvastaaja)



*Muista liiton toimiston avoimet ovet  
Zamenhof-päivänä 15.12. klo 17-19.*

### **NOVAĴOJ EN LA LIBROSERVO – UUTUUKSIA JA FANITUOTTEITA LIITON KIRJAVÄLITYKSESSÄ**

Nun haveblas en la libroservo de  
EAF jenaj verkoj kaj aĵoj:

**UEA en la konscio de esperantistoj 15 €**  
+ sendokostoj

**Tamen ĝi moviĝas! 10,50 €** + sendokostoj  
**Esperanto-poŝlampeto 5 €** + sendokostoj

Mendoj retpoŝte *eafmendoj@esperanto.fi*

*Esperantoliiton kirjavälityksessä on nyt  
saataavissa seuraavat kirjat ja fanituotteet:*

**UEA en la konscio de esperantistoj 15 €**  
+ postikulut

**Tamen ĝi moviĝas! 10,50 €** + postikulut  
**Esperanto-taskulamppu 5 €** + postikulut

Tilattavissa sähköpostitse:  
*eafmendoj@esperanto.fi*

## Fondumo Esperanto festis sian 60-jariĝon

Fondumo Esperanto festis sian 60-jariĝon la 24-an de oktobro en Helsinko. La ĉefparolanto de la festo estis la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, profesoro *Mark Fettes*, kiu prezentis la agadon de la usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation*. Aliaj parolantoj estis *Anna Ritamäki-Sjöstrand*, kiu rakontis pri la iama komuna projekto de EAF kaj la Fondumo "Al kvalita komunikado", kaj *Tatu Lehtilä*, kies temo estis la lingvosciencia esplorado de Esperanto en Universitato de Stokholmo. La feston solenigis ankaŭ la muziko de la kvarteto "Virta".

Fondumo Esperanto estis fondita de *Vilho Setälä* (1892–1985), unu el la plej gravaj finnaj esperantistoj de la pasinta jarcento, kiu estis konata ankaŭ kiel faka verkisto, pioniro de la fotografia arto en Finnlando, kaj honora doktoro de la Universitato de Helsinko. Dum siaj unuaj tri jardekoj la Fondumo funkciis ĉefe kiel eldo-

nejo. Ĝi publikigis interalie la internacie konatan rektametodan lernolibron *Privilegia vojo al lingvoscio* de Setälä mem, la majstran tradukon de *Kalevala* fare de *J. E. Leppäkoski*, esperantologiajn verkojn de *Adolf Holzhaus* kaj reel-donojn de romanoj de *Jean Forge*.

Post la morto de d-ro Setälä la Fondumo estis reorganizita kiel stipendia fondaĵo, kies tasko estas subvencii Esperantan agadon en Finnlando. La reorganizado lerte gvidis *Simo Rautavirta*, kiu nun ĉeestis la feston kiel honora prezidanto. Dum la lastaj jardekoj la Fondumo disdonis stipendiojn kaj subvenciojn, kutime sume inter 5 mil kaj 15 mil eŭroj ĉiujare. Laŭ la nuna prezidanto de la Fondumo, profesoro *Jouko Lindstedt*, ĝia ĉefa tasko estas certigi la kontinuecon de la Esperanta agado en Finnlando.

*Jouko Lindstedt*

## Karavano al la 101-a UK en Nitra

Seuraava Esperanton maailmankongressi on Slovakian Nitrassa kuten hyvin tiedämme. Sinnekin on mahdollista matkustaa yhteisellä bussilla ja siitä oli alustavasti puhetta Lillen karavaanilla.

Sain bussiyhtiö Launokorvelta tiedon, että matka voitaisiin toteuttaa joko niin, että matkustetaan meno-paluuna Saksan laivareittiä Helsinki-Travemünde ja matkalla olisi yksi yöpyminen esim. Prahassa ennen-tullen. Toinen vaihtoehto olisi Baltian kautta toiseen suuntaan ja takaisin laivalla Travemünde-Helsinki. Tällä matkalla pitäisi olla pari yötä matkalla, esim. ensin Latvia-Liettua -akselilla ja sitten Puolan

puolella. Tallinnasta noin 1 700 km Nitraan. Matkan hinta yöpymisineen matkan varrella olisi 1 000 euron paikkeilla (vähintään 20 osallistujaa).

Mikäli kiinnostuit, edes teoriassa, ota yhteyttä liiton sihteeriin:  
Tiina Oittinen, [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi), tel. 050 549 4709.

*Se vin interesas buskaravana vojaĝo el Helsinko, Finnlando al la UK en Nitra venontsomere, petu pliajn informojn de la sekretario de EAF:*

*Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, tel. +358 50 549 4709.*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki) [jukka.pietilainen@helsinki.fi](mailto:jukka.pietilainen@helsinki.fi) (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☐ [onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202 ☐ [kimmo.hannula@creavit.fi](mailto:kimmo.hannula@creavit.fi), [www.esperanto.fi/jyväskylä](http://www.esperanto.fi/jyväskylä)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala ☐ [www.esperanto.fi/oulu](http://www.esperanto.fi/oulu) [aini.esp@hotmail.com](mailto:aini.esp@hotmail.com)
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Carola Antskog) Hedbergsvägen 3 B, 25700 Kimito ☐ [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi)
- ♦ Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere ☐ [www.esperanto.fi/tampere](http://www.esperanto.fi/tampere) (Tapani Aarne: [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi)) ☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. ☐ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi) ☎ 050 549 4709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ☐ [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi) ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☐ [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset

hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). ☐ [esperarto@phnet.fi](mailto:esperarto@phnet.fi).

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna  
aperas dum la jaro

# 2015

Nro	Limdato	Aperas
1/2016	28.1.	en februaro
2/2016	31.3.	en aprilo
3/2016	31.5.	en junio
4/2016	1.9.	en septembro
5/2016	15.11.	en decembro

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoi

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:      Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 €      1/1 sivu/paĝo 50 €

1/2 sivu/paĝo 60 €      1/2 sivu/paĝo 30 €

1/4 sivu/paĝo 40 €      1/4 sivu/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:

[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo:  
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,  
00530 Helsinki.



Posti Green

## Serĉata respondeculo pri "Muut lehdet"

Tiu rubriko aperis siatempe regule en Esperantolehti redaktata de *Jukka Noponen*. Antaŭ kelka tempo ni dankis lin pro bona kontribuo, kiam li rezignis pri la tasko.

Do: Se vin interesas sekvi la gazetaron kaj reton pri ĉio Esperanto-rilata, bonvolu vin anonci al la redakcio ([eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)).

Tio ja ne signifas, ke vi ĉion mem trovu, tra legu ĉion; vi estos konata kiel la persono, al kiu sendi informojn kaj gazeteltondadojn, kaj vi resumos en EL. Estos via tasko ankaŭ

konservi tiujn, "pitää leikekirjaa".

*Jos olet kiinnostunut seuraamaan esperantoasioita suomalaisissa tiedotusvälineissä ja kirjoittamaan niistä yhteenvedon Esperantolehteen suomeksi, olet etsimämme henkilö. Aiemmin Muut lehdet -palstaa toimitti ansiokkaasti Jukka Noponen usean vuoden ajan. Ilmoittaudu lehden osoitteeseen [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).*

## Serĉata respondeculo pri fotoarkivo

Ni bezonas kompetentan homon por la fotoarkivo de EAF. Estas kaj paperkopio kaj elektra fotaroj, kiujn prizorgi kaj ordigi estas de granda signifo por nia laboro tiel gazeta kiel histo-

ria. Ciferecigo de niaj ampleksaj foto-trezoroj estas interesa defio...

Anoncu vin ĉe la adreso de EL [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).

### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Aineisto 28.1.2016 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en februaro. Artikoloj ĝis 28.1.2016 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: [<eafgazeto@esperanto.fi>](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).